

La Nobel-premiitoj : Centa datreveno de la naskiĝo de la Nobel-pacpremiito
Albert Schweizer, 6-a parto. Frédéric Passy, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 594, 1975.02.26 & 03.01

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Okaze de la jubileo Albert Schweizer ni prezentas al vi historieton de la Nobel-pacpremiitaro. Vi aŭdas la sesan prelegon de tiu serio.

A.- La pasintan semajnon ni prezentis la personecon de la parizano Frédéric Passy, tiu ekonomiisto, kiu havis la kuraĝon sendi leteron al la gazeto *Le Temps* en 1867, okaze de komenco de armita konflikto inter la imperiestroj de Prusio kaj Francio. La preteksto estis Duklando Luksemburgio. Alfluo de apogaj leteroj el Francio kaj Germanio atestis, ke ekzistis forta publika opinio kontraŭ la intencita milito.

Cl.- Konstatante tiun movadon de la publika opinio kontraŭ germana-franca milito, la brita registaro prezidita de Gladstone, citante klaŭzon de Konferenco okazinta en Parizo en 1856, proponis sian arbitraciaron. Tiu klaŭzo estis la 23-a Protokolo de tiu Pariza Konferenco. Ĝi malpermesis al la subskribintaj Potencoj komenci militon sen esti unue sin turnintaj al la juĝado de amika Registaro. La arbitraciado de la Brita Registaro estis akceptita de ambaŭ batalontoj kaj la juĝo kondukis al la neŭtraligo de Luksemburgio kaj al la malkonstruo de la fortikaĵoj de tiu Duklando. La armeoj de Prusio kaj Francio devis retiriĝi.

A.- Frédéric Passy fariĝis mondfama. Multe da leteroj li ricevis. Resume ili diras : « *Vi malhelpis militon. Tio estas bonega, sed ne sufiĉa. Estas necese malhelpi la militadon mem malebligante la naskiĝon de militoj. Tiucele devas esti kreita Ligo de popoloj, kies sekretario vi fariĝu.* »

Cl.- Ekde tiu jaro la gazeto *Le Temps*, la antaŭulo de la nuna *Le Monde*, malfermis rubrikon pri la internacia vivo kaj pri la neceso de konstanta arbitracia kortumo, kiun regule nutris Frédéric Passy. Lia kroniko ludis tre gravan rolon favore al la disvolviĝo de la internacia juro. Kaj fine de sia vivo Frédéric Passy havis la rekompencon vidi ekfunkcii en den Hago, la ĉefurbo de Nederlando, Konstanta Arbitracia Kortumo.

A.- Frédéric Passy ne restis surda al la alvokoj, kiujn li ricevis. Kun la helpo de la industriisto Jean Dollfus, alzacano avangarda socie kaj politike, li fondis la organizaĵon Internacia kaj **Konstanta Ligo de la Paco**, en la franca lingvo : **Ligue internationale et permanente de la Paix**. Jean Dollfus, la prezidanto de tiu ligo de la paco, malfermis al ĝi budon en la alzata pavilono de la Universala Ekspozicio ĵus okazonta en Parizo. Li kolektis mon-donacojn, kiuj formis unuan fonduson por la porpaca propagando. Kaj Frédéric Passy forlasis siajn profesiajn okupojn por fariĝi la sekretario de tiu naskiĝanta organizaĵo.

Cl.- La tiama franca registaro akceptis la arbitraciaron kontraŭvole. La imperiestro Napoleono la tria kaj liaj ministroj, kiuj faris belajn proklamojn favore al la malarmado, samtempe per ĉiuj rimedoj serĉadis militpretekston kontraŭ Prusio. Ĉia porpaca aktiveco estis malpermesita al Frédéric Passy. La Ministro de la interna politiko, sinjoro *de Lavalette*, malpermesis la malfermon de packonferenco en la Universala Ekspozicio, kaj estas nur kiam li estis informita de la buŝo mem de Frédéric Passy, ke cirkulero estis prespreta, por kunvoki la francajn membrojn de la pacligo en la fremda urbo Bruselo, ke la ministro rezignis je sia

absoluta kontraŭstaro. Unua ĝenerala asembleo ricevis la rajton disvolviĝi. Parolado de la brita pacisto Henry Richard lasis al ĉiuj kunvenintoj viglan impreson.

A.- Dua konveno okazis en 1869. La katolika pastro Hyacinthe, kiu kurtaĝis paroli apud la granda rabeno Isidor kaj la protestanta pastoro Martin-Paschoud, estis poste vigle akuzita de la eklezio. Estas menciinde, ke la ekleziaj medioj, kaj inter ili ĉefe la katolika hierarkio, aktive malhelpis la formiĝantajn pacmovadojn. Pastroj, kiuj kuraĝis prediki favore al la paco kaj internacia arbitrado, estis ne nur mallaŭditaj, sed perdis la rajton prediki. Tiel ekzemple estis por pastro *Charles Perraud*, kiu post prediko en la preĝejo Saint-Roch en Parizo, estis silentigita dum du jaroj, la jaroj, kiuj permesus krei klimaton favoran al la milito, kiu alfrontigos Francion kaj Prusion en 1870.

Cl.- Ni mencias tiujn faktojn por komprenigi, ke tiam la porpaca luktado ne estis sendanĝera. La pacistoj estis soluloj. Frédéric Passy, kiu ĝis tiu periodo estis praktikanta katoliko vizitanta la meson ĉiudimanĉe, iom post iom forlasos la katolikismon favore al tre liberala protestantismo.

A.- En julio 1870, kiam eksplodis la german-franca milito, kiun fakte deklaris la Franca Registaro, Frédéric Passy kaj liaj amikoj uzos ĉiujn eblajn rimedojn por kriegi sian malkonsenton. Sed ilia protesto estos sen efiko, eĉ iliaj leteroj al la imperiestroj.

Cl.- Prédéric Passy rifuĝis kun sia familio en Bretonion. Li tiam ricevis leteron de sia brita pac-amiko Henry Richard, kiu alportis kortuŝan oferproponon. Ni citas : « *Vi estas senhavigita de via kutima gajno, eble vi ne havas la eblecon trovi alian salajron. Mi ne estas riĉa, sed mi povus – kaj tion mi volonte farus – meti je via dispono mian modestan stipendion.* » Nur escepta hazardo permesis al Frédéric Passy ne profiti pri tiu amika helpo, kiu atestas la profundecon de la ligoj, kiuj ekzistis inter la francaj kaj britaj pacistoj.

A.- Tiu milito faligis la imperiestron Napoleono. Sed la malvenko, kiu perdigis al Francio la provincojn Alzaco kaj Loreno, ne vekos pacemajn sentojn. Kontraŭe malamo al la germanoj nutros tutan generacion. Frédéric Passy ne submetiĝis al tiu kolektiva reago. Pri tio ni parolos la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!